Por ĉiutagaj informoj, eventoj kaj interesaj enhavoj, sekvu ankaŭ nian paĝon ĉe Facebook kaj Twitter.

# tejo:aktuale

n°480 | Januaro 2023

**Bonvenon en 2023!** Por bone komenci la jaron, aliĝu al IJK 2023, kaj se vi bezonas subtenon, partoprenu la konkurson "Partoprenu IJK-n". Se vi jam vidas pli for en la estonteco, kandidatiĝu por gastigi IJK-n 2024! Malvarmas, pluvas, aŭ tro varmas ĉe vi, kaj vi volas resti hejme? Kontribuu al la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, aŭ spektu la plej novan videon de Easy Languages. Post ripozo, preparu vian vojaĝon al Katalunio aŭ Italio por partopreni mojosajn eventojn. **Havu belan monaton!**




Revenas la tradicia konkurso **"**Partoprenu IJK-n**"** por subteni junulojn el la tuta mondo kiuj ŝatus ĉeesti en la plej granda junulara evento de la jaro. Kiel partopreni aŭ subteni? Legu ĉiujn kondiĉojn de la konkurso ĉi tie: tejo.org/konkurso2023.




**Lasta tago por aliĝi al IJK2023!** Ne prokrastu vian aliĝon ĝis la lasta momento. Aliĝu ĝis la 31-a de januaro por profiti de la plej favoraj prezoj! Kuru al ijk2023.tejo.org/alighilo tuj!




**Invitu IJK-n 2024 en via lando!** Restas nun nur kelkaj tagoj por kandidatiĝi por gastigi la IJK-n. Daŭrigu la longdaŭran tradicion de la plej granda kaj mojosa internacia evento de la mondo: anoncu vin!




La Komisiono pri **Edukado, Scienco, & Kulturo** organizas serion da eventoj por soleni la **Internacian Tagon de la Gepatra Lingvo**. Rapidaj lingvokursoj, Kultura Horo, lingva kvizo, aligatorejo... kaj pli estas jam planitaj. Baldaŭ aperos informo. **Ĉu vi ŝatus kontribui aŭ konas iun, kiu povas kontribui?** Ĉu vi ŝatus prezenti al junuloj vian lingvon? Kontaktu albert.stalin@tejo.org ĝis la 3-a de februaro.

# Lastatempa agado

Okaze de la internacia semajno pri afrikaj lingvoj, ni okazigis **KIAL (Kunsido Internacia de Afrikaj Lingvoj)**. Ĉeestantoj aŭdis prelegojn pri la volofa kaj la malagasa lingvo, aŭ koncerton en la svahila kaj la zulua. Ni aperigos partojn de la kunsido en niaj sociaj kanaloj!




La fama reto **Easy Languages**, kiu subtenas lingvolernadon, publikigis sian unuan filmeton pri Esperanto! Ĝi estis filmita dum IJK en Nederlando, do vi trovos tie multajn konatajn vizaĝojn. Spektu ĝin, kaj montru al viaj amikoj!




# Venontaj eventoj




La **RenKEJtiĝo** estas la unua renkontiĝo de la Kataluna Esperanta Junularo, kaj okazos inter la **24-a kaj la 26-a de Februaro** en **Manresa** (Katalunio). Ekskursoj, kursoj por ĉiuj niveloj, *calçotada*, partoprenludoj, vingustumado kaj lokaj produktoj estas planitaj. [Aliĝu kaj vizitu Katalunion!]





IEJ ĝoje anoncas la okazon de **IJF 2023** en **Palmi (RC)**, inter la **5-a kaj la 11-a de Aprilo**. La urbo, lokita en Kalabrio ĉe la Mediteranea maro, estos la plej suda gasto de la historia Festivalo! [Aliĝu] por povi naĝi, promeni, gustumi bonegajn manĝojn kaj vivi novajn spertojn!

---

Trovu pli da eventoj sur la retejo [eventaservo.org].

**Por pli da TEJO eventoj, alklaku la bildon!**



---




**Iĝu parto de nia tutmonda komunumo!**
[MEMBRIĜU EN TEJO!]

Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj, kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

---

**Ĉu vi volas kontribui sendante interasajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO Aktuale?**

Sendu viajn novaĵojn al **tejoaktuale@tejo.org** antaŭ la 23-a tago de la monato

Antaŭdankon pro la helpo!

# Kolofono

***TEJO Aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** Jeanne Grimaud
**Kontribuanto de ĉi tiu numero:**
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2023 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn?
Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni vin de ĉi retpoŝta bulteno.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?*    unsubscribe from this list    update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands